

STATUTO

DE

H. E. J. S.

HISPANA ESPERANTISTA  
JUNULARA SOCIETO


---

JUNULARA SEKCIO DE H. E. F.  
(HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO)

---

HISPANA LANDA SEKCIO DE T. E. J. O  
(TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO)

Decembro 1986



## STATUTO DE HEJS

### ^ I GENERALAJ PRINCIPOJ

#### 1.- NOMO;

La nomo de la organizo estas Hispana Esperantista Junulara Societo, mallongigite, HEJS,

#### 2.- POZICIO,

2.1, HEJS estas la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO),

2.2, La estraranoj de HEJS estas en daŭra kontakto kun tiuj de HEF kaj TEJO per reciproka komunikado,

#### 3.- KONSISTO,

HEJS konsistas el federaciigitaj asocioj kaj individuaj membroj.

#### 4.- CELOJ,

4.1, La celo de HEJS estas la disvastigo kaj plifortigo de la ideo kaj instruado de lingvo internacia, kaj, pli konkrete, de Esperanto, precipe en junularaj medioj.

#### 4.2, Rimedoj;

4.2.1, Informado pri la internacia lingvo,

4.2.2, Praktika utiligo de la internacia lingvo je la servo de la junularo,

4.2.3, Okazigo de kongresoj, tendaroj, seminarioj kaj alispetaj rekontiĝoj,

## STATUTO DE HEJS

4.2.4. Preparado de la membrero al aktiva partopreno en la ĝenerala Esperanto-movado,

### 5.- DIFINO.

HEJS estas neŭtrala organizo rilate al politikaj, sociaj, religiaj kaj filozofiaj demandoj, kiuj ne rilatas rekte al la internacilingva problemo, kaj ĝi konsideras bazon de sia agado la aktivan strebado al respekto kaj plenumo de la Homaj Rajtoj.

### 6.- SIDEJO.

La sidejo de HEJS troviĝas tie kie la Estraro decidas, kaj ĝi povas esti ŝanĝata,

### 7.- LINGVOJ.

La oficiala lingvo de HEJS estas la lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia Fundamento kaj per sia verkaro, Labora lingvo povas esti kiu ajn,

## II MEMBRECO

### 8.- MEMBROKATEGORIOJ.

8.1. HEJS havas federaciajn kaj individuajn membrojn, kiel ankaŭ honorajn membrojn, honorajn prezidantojn, kaj protektantoj,

8.2. Federaciaj kaj individuaj membroj povas esti gejunuloj, kiu aĝas ĝis inkluzive tridek jaroj. Escepte, la membroj de la gvidorganoj povas esti maksimume du jaroj pli aĝaj. La aĝo de honoraj membroj, honoraj prezidantoj kaj protektantoj ne estas limigita,

## STATUTO DE HEJS

8.3. Federaciaj membroj estas la membroj de la federaciigintaj asocioj aŭ organizoj, konformaj al la agolimo difinita en la artikolo 8.2., kaj por kiuj la koncerna asocio aŭ organizo pagas la specifan jaran kotizon.

8.4. Individuaj membroj estas la membroj de HEF kies ago konformas la artikolo 8.2. .

8.5. Kiel honoraj membroj povas esti elektitaj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la junulara Esperanto-movado.

8.6. Kiel honoraj prezidantoj povas esti elektitaj nur personoj, kiuj, krom plenumi la artikolon 8.5., havis eksterordinarajn meritojn por HEJS.

### 9.- ASOCIOJ AŬ ORGANIZOJ FEDERACIIĜINTAJ AL HEJS.

9.1. Povas federaciigi al HEJS jenaj esperantistaj asocioj aŭ organizoj:

9.1.1. Junularaj Asocioj aŭ Organizoj, kies agadteritorio respondas al unu el la Aŭtonomaj Komunumoj, kiuj konsistigas la Hispanan Ŝtaton, kaj estas organizitaj kiel tiaj.

9.1.2. Provincaj, komarkaj aŭ lokaj grupoj aŭ junularaj sekcioj de grupoj, kiuj ne apartenas al aŭtonomkomunuma asocio aŭ organizo pli frue federaciiginta al HEJS.

9.2. Asocioj aŭ organizoj difinitaj en artikolo 9.1, federaciigas al HEJS post akcepto de ties komitato,

### 10.- EKSIĜO KAJ EKSIĜO.

10.1. Membroj, honoraj membroj, honoraj prezidantoj kaj federaciigintaj asocioj aŭ organizoj, kiuj evidente kontraŭlaboras la celon de HEJS aŭ nekontentige plenumas siajn devojn al la organizo, povas esti eksigitaj laŭ decido de la komitato.

10.2. La eksigo de la federaciigintaj asocioj aŭ organizoj devas esti skribe deklarita, ĝi validas ekde la fino de la administra jaro.

## STATUTO DE HEJS

10.3. Federaciiginta asocio aŭ organizo, aŭ individua membro, kiu, malgraŭ skriba averto, ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiginta.

### 11. - PROTEKTANTOJ.

Estas personoj aŭ organizoj, kiu(j), simpatie al HEJS, finance helpas ĝin. La komitato fiksas por ili specialan kotizon.

## III GVIDORGANOJ

### 12. - KOMITATO.

12.1. La supera instanco de HEJS estas la Komitato, kiu konsistas el:

12.1.1. Komitatanoj A, reprezentantaj la federaciigintajn asociojn aŭ organizojn, elektataj de ĉi tiuj.

12.1.2. Komitatanoj B, elektataj de la individuaj membroj.

12.1.3. Komitatanoj C, elektataj de la tuta komitato, ĝis maksimuma nombro de unu sesono de la tuto de komitatanoj A kaj B kune.

12.1.4. Komitatanoj Ĉ, membroj de la estraro ne jam komitatanoj A, B aŭ C.

12.2. Proporcio da komitatanoj kaj elekto.

12.2.1. Ĉiu federaciiginta asocio aŭ organizo kun almenaŭ kvin aktivaj membroj rajtas al komitatanoj A laŭ la jena proporcio:

\* kvin ĝis dek kvin membroj; unu komitatano,

\* dek ses ĝis tridek membroj; du komitatanoj,

\* tridek unu ĝis sesdek membroj; tri komitatanoj,

\* sesdek unu ĝis cent kvindek membroj; kvar komitatanoj, kaj

\* cent kvindek unu aŭ pli; kvin komitatanoj.

12.2.2. La tuton de la individuaj membroj rajtas al komitatanoj B laŭ la proporcioj difinitaj en la artikolo 12.2.1., kaj la elekto okazas dum oficiala kunveno de HEJS.

12.2.3. Por certigi al HEJS la kunlaboron de spertuloj, la Komitato povas elekti komitatanojn C, ĝis maksimuma nombro de unu sesono el la tuto de komitatanoj A kaj B kune, post certiĝo de ilia preteco kunlabori efike en la agado.

## STATUTO DE HEJS

12.3. Kondiĉoj de komitatanejo.

12.3.1. Ĉiuj komitatoj devas esti membroj de HEJS. Ĉiuj komitatoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj. Ĉiuj komitatoj estas akselekteblaj per la sama proceduro per kiu ili estis elektataj.

12.3.2. La ofico de la komitatoj daŭras unu jaron.

12.3.3. Ĉiu membro de HEJS rajtas havi nur unu komitatanecon.

12.4. Komitato A, kiu ne povas partopreni kun-sidon de la komitato, devas nomumi anstataŭanton, skriba aprobitan de la koncerna asocio aŭ organizo. La anstataŭanto devas esti membro de HEJS, kaj havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia komitato. Komitatoj B, C, Ĉ, ne estas anstataŭeblaj.

12.5. La Komitato

12.5.1. Elektas la estraron de HEJS.

12.5.2. Rajtas elekti honorajn membrojn kaj honorajn prezidantojn.

12.5.3. Difinas la ĝeneralan agadon de HEJS.

12.5.4. Decidas pri la federaciigo kaj eksigo de asocioj aŭ organizoj.

12.5.5. Decidas pri la eksigo de individuaj membroj, honoraj membroj, kaj honoraj prezidantoj.

12.5.6. Decidas pri regularoj.

12.5.7. Diskutas kaj aprobas la jARBilancon kaj la buĝeton.

12.5.8. Fiksas la kotizojn.

12.5.9. Decidas pri la agado de la estraro.

12.5.10. Decidas pri la aferoj ne rezervitaj al la aliaj organoj kaj rajtas decidi en ĉiuj aferoj pri kiuj kompetentas la Estraro.

## 13. - ESTRARO.

13.1. La Estraro konsistas el: prezidanto, unu aŭ du vicprezidantoj, ĝenerala sekretario, estrarano pri financoj, kaj laŭ-bezone pliaj estraranoj; kaj ĝi estas elektita de la Komitato. Ĉiu membro de la estraro oficas dum du jaroj kaj povas esti reelektita.

13.2. La Estraro:

13.2.1. Plenumas la decidojn de la Komitato.

13.2.2. Nomumas la redaktoro(j)n de la presorgano(j) de HEJS.

13.2.3. Decidas pri la loko kaj daŭro de la kongresoj, tendaroj, seminarioj kaj alispecaj renkontigoj de HEJS.

## STATUTO DE HEJS

13.2.4. Kreas novajn servojn.

13.3. La prezidanto reprezentas al HEJS kaj subskribas kun la ĝenerala sekretario la ĉefajn dokumentojn, prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la kunvenojn de HEJS.

13.4. La vicprezidantoj, laŭbezone, anstataŭas la prezidanton.

13.5. La ĝenerala sekretario zorgas pri la efektiviĝo de la decidoj de la Komitato kaj de la Estraro, aranĝas la jaran raporton pri la agado de HEJS.

13.6. La estrarano pri financoj administras la monaferojn de HEJS.

13.7. Ĉiuj estraranoj plenumas laŭbezone komisiitajn taskojn.

14.- REDAKTORO(J) DE LA PRESORGANO(J).

Plenumas siajn redaktajn taskojn laŭ la ĝenerala gvidlinio difinita de la Komitato, kaj respondecas al la Estraro.

15.- KOMISIONOJ KAJ KOMISITOJ.

En la kadro de sia kompetenteco, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti specialajn komisionon aŭ komisiito(j)n por esplori iu(j)n aŭ por plenumi difinitajn taskojn. Post la plenumo de la tasko ĉiu komisiono aŭ komisiito devas skribi raporti al la elektinta organo.

16.- LABORMANIERO DE LA GUIDORGANOJ.

16.1. La Komitato kaj la Estraro kunvenas almenaŭ unu fojon jare laŭbezone.

16.2. En la voĉdonadoj, validas la plimulto de la voĉdonintoj. Okaze de voĉegaleco decidas la prezidanto de la koncerna gvidorgano. Decidoj, kiujn partprenis malpli ol duono de la rajtanoj, devas esti



## STATUTO DE HEJS

submetita al poŝta skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonantoj.

### IV FINANCOJ

17.- ENSPEZOJ; ĜIA UTILIGO

17.1. La enspezoj de HEJS konsistas el:

17.1.1. Membrokotizoj,

17.1.2. Monprofito de la agadoj de la organizo,

17.1.3. Donacoj, heredaĵoj kaj subvencioj.

17.2. La enspezoj estas utiligataj por kovri unue la enbuĝetigitajn elspezojn kaj la administradon de HEJS.

### V GENERALA VOĈDONADO

18.- OKAZIGO,

18.1. Ĝi okazas:

18.1.1. Se la Komitato, aŭ, okaze de urĝeco, la Estraro tion decidas,

18.1.2. Se la federaciigintaj asocioj aŭ organizoj reprezentantaj almenaŭ kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia skriba subskribo, en tempolimo de kvardek kvin tagoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta skriba postulo,

18.1.3. Se almenaŭ kvarono de la individuaj membroj ĝin postulas per sia skriba subskribo, en tempolimo de kvardek kvin tagoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta skriba postulo,

18.2. La ĝenerala sekretario ĝin aranĝas plej malfrue kvardek kvin tagojn post ricevo de sufiĉa nombro de skribaj postuloj.

18.3. Tiu voĉdono esprimas sin pri demandoj submetitaj de la instanco kiu postulis la ĝeneralan voĉdonadon.

19.- KALKULO DE VOĈDONOJ.

19.1. Ĉiu federaciiginta asocio aŭ organizo havas nombron da voĉdonoj egalan al nombro de siaj membroj, por kiuj la kotizo estas pagita je la dato de aranĝado de la voĉdonado.

19.2. La individuaj membroj voĉdonas individue; ĉiu membro rajtas al unu voĉdono, kiu ne povas esti delegita al alia persono nek organizo.

19.3. En la voĉdonado validas la plimulto de la esprimitaj voĉdonoj. Por ŝanĝi la Statuton aŭ malfondi la Organizon, necesas almenaŭ du trionoj de la esprimitaj voĉdonoj, kondiĉe ke tiuj voĉdonoj reprezentu minimume la duonon de la membraro.

20.- KONTROLO.

La ĝenerala voĉdonado estas skriba, kaj la voĉdonoj estas kalkulitaj kvardek kvin tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj. La voĉdonojn kalkulas persono proponita de la instanco kiu postulis la ĝeneralan voĉdonadon, en ĉeesto de tri membroj nomumitaj de la Komitato de HEJS. Ĉiu kontrolinto skribe certigas la ĝustecon de la proceduro.

VI  
ŜANĜO DE LA STATUTO

21.- ŜANĜO.

La Komitato de HEJS kompetentas pri ŝanĝo de ĉi Statuto. Pri la statutsanĝoj, la ĝenerala sekretario informas al la estraroj de HEF kaj TEJO.

## STATUTO DE HEJS

### VII MALFONDO DE LA ORGANIZO

#### 22. - MALFONDO,

HEJS malfondigos laŭ propono de sia Komitato post ratifo per ĝenerala voĉdonado en kiu voĉdonis favore al tiu decido almenaŭ du trionoj de la membraro. Post la malfondo de HEJS ĝia mono kaj havaĵoj apartenos al HEF.

### VIII VALIDIGO DE LA STATUTO

#### 23. - VALIDIGO

Post la akcepto de ĉi tiu Statuto ĉesas validi ĉiuj antaŭaj reguloj, kiuj kontraŭas ĝiajn principojn kaj regulojn.

ARTICULO 1.º

1.1. La Unia Hispana Esperantista Junulara es una asociación de personas que se unen para promover el uso de la lengua esperanto en el ámbito de la juventud.

1.2. La Unia Hispana Esperantista Junulara tiene como objetivo principal el fomento de la enseñanza y el uso de la lengua esperanto entre la juventud hispana.

1.3. La Unia Hispana Esperantista Junulara se constituye en un organismo de carácter no lucrativo, cuyo fin es el de promover el uso de la lengua esperanto entre la juventud hispana.

ARTICULO 2.º



2.1. La Unia Hispana Esperantista Junulara se constituye en un organismo de carácter no lucrativo, cuyo fin es el de promover el uso de la lengua esperanto entre la juventud hispana.

ARTICULO 3.º

3.1. La Unia Hispana Esperantista Junulara se constituye en un organismo de carácter no lucrativo, cuyo fin es el de promover el uso de la lengua esperanto entre la juventud hispana.